

Protokolo de la Komitataj Kunsidoj de ILEI okazintaj kadre de la 41-a ILEI-Konferenco en Porto Novo (Benino) 19/07-05/08/2008

Listo de mallongigoj:

AC: Aida ČIŽIKAITĚ

AOR: Atilio ORELLANA ROJAS

IEK: Internacia Ekzamena Komisiono

IK: Interkulturo

JA: Juna Amiko

MG: Mireille GROSJEAN

RP: Radojica PETROVIĆ

SB: Sjoerd BOSGA

UL: Ulla LUIN

ZK: Zsófia KORODY

1. Enkonduko

1.1 Bonvenigo

Aida ČIŽIKAITĚ bonvenigas la ĉeestantojn nome de la ILEI-Prezidanto.

1.2 Kontrolo de la kvorumo

La kunsidon ĉeestas AC (Estrarano), Penelope VOS (AU), Jozeph TCHOKPODO (BJ), Mireille GROSJEAN (CH), Monique Arnaud (FR), Francois Lo JACOMO (FR), Renée Triolle (FR), Tieko ISIKAWA (JP), Yasuo HORI (JP), Minny MASSAR (NL), Simon SMITS (NL).

Kvorumo ne ĉeestas, sekve ĉiuj decidoj ekde punkto 1.4 devos esti konfirmitaj de la komitato per perpoŝta voĉdonado.

1.3 Definitivigo de la tagordo

La tagordo estas akceptita sen modifoj.

1.4 Aprobo de la protokolo da la antaŭa kunsido

Akcepto de la protokolo estas petata.

1.5 Starigo de komisionoj kaj laborgrupoj

Ne estas starigitaj komisionoj aŭ laborgrupoj.

2. Raportoj

2.1 Jarraporto

Estas demandoj pri la konsisto de la estraro kaj pri la demisio de SB kaj pri la posteno de ZK. AC klarigas, ke SB neniam demisiis kaj ke ZK estas estrarano, kiu plu zorgas pri Instrukapabligado kaj Instruaj Centroj.

Oni rimarkigas, ke estrarano pri informado mankas kaj necesas trovi tian personon aŭ komisiiton ekster la estraro por plenumi la taskon.

Akcepto de la Jarraporto kaj malŝarĝo de la Estraro estas petata.

3. Landa kaj regiona agadoj

3.1 Raporto de Sekciestroj kaj Reprezentantoj

Raportoj de diversaj Sekcioj estis senditaj rete de la Sekretario.

4. Komisionoj

4.1 Ekzamena

La raporto estis sendita de la Sekretario. MG informas pri la nuna konsisto de la IEK kaj

informas, ke 3 el la membroj post la fino de ilia periodo ne pretas rekandidatiĝi. Ŝi sciigas ankaŭ, ke la nuna konsisto de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro kalkulas je proksimume 70 membroj kaj IEK celas atingi 200 rajtigitojn.

4.2 Lerneja

La raporto estas sendita de la Sekretario.

4.3 Terminara

Ne estas raporto.

4.4 Statuta

Ne estas raporto.

5. Financoj

5.1 Financa raporto 2006 kaj 2007

5.2 Raporto de la Kontrola Komisiono

5.3 Bugetoj 2008 kaj 2009

Ĉiuj dokumentoj estas grupe diskutitaj. AC sciigas, ke la kasisto pro profesiaj kialoj povis malpli da tempo dediĉi al ILEI.

Akcepto kaj aprobo de ĉiuj dokumentoj estas rekomendata.

6. Instrukapbligado kaj ekzamenado

6.1. Projektoj

6.1.1. Esperanto-instruistoj por Afriko

En februaro 2007, 15 personoj partoprenis en seminario pri lernado kaj instruado organizita de ILEI en Benino.

6.1.2. Flugiloj de malfacila vento

Ĉi tiu projekto celas eduki junulojn por kompetentigi ilin al instruado. Seminarioj daŭre okazas kaj ILEI plu estas engaĝita en ĝi.

Alia projekto menciita estas Inter-Kulturo.

6.2. Interkonsento kun UAM

AC menciis, ke estas farita kontrakto kun UAM kaj ke estas prilaborita programo kaj ke ĉijare estos la unuaj diplomitoj.

6.3. KER-projekto

6.4. Programo de instruista trejnado

7. Eldonado

7.1 Internacia Pedagogia Revuo

La ĉeestantoj esprimas sian la deziron, ke la literoj en la aliĝilo al la Konferenco estu pli grandaj kaj se necese, ke ĝi aperu kiel aparte loza folio. La ĉeestantoj petas, ke estu pli da faka materialo en la revuo, sed resti kiel faka kaj movada revuo smatempe. AC sciigas, ke jam estas kreita Scienca Komitato, kiu recenzas fakajn artikolojn.

7.2 Juna Amiko

Estas konstatite, ke grava problemo rilate al JA troviĝas pro la altaj kostoj de dissendo. La revuo ne plu havas 4 numerojn jare, sed 3 kaj samtempe ĝi enhavas pli da paĝoj.

7.3 Aliaj eldonaĵoj

Estas levita la demando pri la lokiĝo de la arkivo de ILEI. AC sciigas, ke ĉe la ILEI-sidejo en Den Haag troviĝas stoketo de IPR. Renée TRIOLLE sugestas kontakti la Nacian Bibliotekon de Vieno, kiu ciferece povus stoki. Plia sugesto estas lokigo ĉe CDLI.

8. Konferencoj

8.1 Konferenco 2008

AC raportas, ke aliĝis 73 personoj el 16 landoj, ĉeestas 45 el kiuj 24 afrikanoj. [Postnoto 2013: La vera aliĝnombro estis 38. La diferenco okazis pro enkalkulo de lernantoj de lernejo kiun la konferencanoj vizitis dum unu ekskurso. Tiuj ne partoprenis la konferencon, nek aliĝis.](#)

8.2 Konferenco 2009

La Konferenco okazos en Krakovo antaŭ la Universala Kongreso. Dum ĝi okazos la kutimaj Lingva Festivalo kaj Simpozio kaj ankaŭ kunveno de universitataj profesoroj.

8.3 Konferenco 2010

Pri la lando kaj dato de tiu konferenco ne estas ankoraŭ decido, sed estas sinproponoj de Bulgario kaj Kubo. La ĉeestantoj montris sian preferon por Kubo pro la proksimeco al la loko, kie okazos la Universala Kongreso tiujare.

9. Eksteraj rilatoj

9.1 Rilatoj kun la E-Movado

Estas konstatite, ke AOR reprezentas ILEI ĉe la UEA-Komitato kaj Claude NOURMONT reprezentas UEA ĉe ILEI kiel observanto. Observanto de ILEI ĉe UEA estas RP. Cetere, AC informas pri la rilatoj inter ILEI kaj lernu.net, AIS kaj ISAE kaj pri la kontrakto subskribita kun la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan (Pollando) pri komuna agado.

9.2 Rilatoj kun ne E-organizoj

9.2.1 UNESKO

ILEI ne plu havas ofialajn rilatojn al UNESKO. Dum la lasta Ĝenerala Konferenco, la pleno devis decidi ĉu reprezentanto de ILEI rajtas ĉeesti.

Nuntempe estas verkita libreto de afrikanoj por afrikanoj pri A-vitamino, kadre de serio eldonota de ILEI. Jean-Pierre BOULET zorgas pri la tuto.

9.2.2 FIPLV

Ĉe tiu organizo Jennifer BISHOP reprezentas ILEI.

9.2.3 Aliaj organizoj

AC raportas, ke la membriĝo ĉe ALTE kostas € 2000,00 jare sed ĝi donas altan agnoskon kaj taskadon en lingvoinstruado. [Postnoto 2103 SMG/ZSK: membriĝo en ALTE certe ne kostas tiom – ne estas jara kotizo, nur kosto partopreni iliajn aranĝojn. Eble temis pri stariga sumo por la ekzamenoj KER/ITK, kiuj tiutempe estis fonditaj, kaj ja havas malraktan ligon kun ALTE.](#)

10. Ceteraĵoj

Estas nenio plia por trakti.

Protokolis:

Aida ČIŽIKAITĖ

Simon SMITS

Renée TRIOLLE